

FEDERACIO ESPERANTO AUVERGNE (AGADRAPORTO 2008-2009)

1. MEMBRARO

La membraro estas preskaŭ stabila : ĉirkaŭ 70 (la junaj forlasas la regionon, kelkaj tre maljunaj forpasis) : Puy-de-Dôme : 40 ; Allier : 24 ; Haute-Loire : 4 ; Cantal : 2 UFE membroj : 14 (kelkaj rezignis pri membreco al UFE pro malofteco de LME).

2. ADMINISTRADO

En la federacio funkcias 2 kluboj (Clermont-Fd kaj Moulins) kaj 3 grupoj (Montluçon, Mozac kaj Vichy). En la 5 centroj okazas kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

La federacio ne eldonas bultenon sed rilatas kun la membroj rete kaj per leteroj per poŝte senditaj. Libroservo ne ekzistas. Federacio havas nur malgrandan stokon de libroj kaj vortaroj. Libro estas aĉeteblaj nur laŭ bezono (ĉirkaŭ 250-300 € jare). La Ĝenerala Asembleo de la federacio okazis en la 13-12-2008.

3. INFORMADO

Ekspozicioj pri Esperanto estis prezentataj okaze de asociaj Forumoj : en MOZAC - apud Riom (63) en septembro 2009 ; en BELLERIVE sur ALLIER (03) kaj en Moulins (03) en oktobro 2009. Aparta ekspozicio estis organizita en la Urbodomo de Montluçon (03) en novembro 2008.

Intervjuoj okazis en lokaj radio stacioj : RADIO ARVERNE (Gerzat -63) la 31an de marto 2009 kun Prof. P.JANTON ; RADIO ALTITUDE (Clermont-Fd) la 19an de oktobro kaj RADIO ARVERNE (Gerzat) la 20an de oktobro kun la kuba esperantista paro.

Pluraj artikoloj – kun fotoj (kelkfoje multkoloraj) pri agado de la lokaj grupoj kaj kluboj aperis en la ĵurnalo LA MONTAGNE kaj gazeto « LA GAZETTE BOURBONNAISE ». La plej granda (preskaŭ tutpaĝa) aperis en LA MONTAGNE - kun grandlitera anonco sur la frontpaĝo : « L'Esperanto, terre promise des voyageurs du monde » okaze de la prelego en Mozac de la kuba esperantista paro : YOANDRA RODRIGUEZ kaj NORBERTO DIAZ. Tio estas ekzemplo ke gastigado de eksterlandaj esperantistoj esta efika SENPAGA (krom la laboro reklamilo por la internacia lingvo.

Menciinda estas ankaŭ la celebrado de la « EUROPA TAGO DE LINGVOJ » organizita fare de la Federacio en CLERMONT-Fd.

4. INSTRUADO KAJ EKZAMENOJ

Esperantokursoj funkcias en : Clermont-Fd, Moulins, Montluçon, Mozac, Vichy.

Ekzameno – 1a grada estis organizita la 7an de decembro 2008 en COURNON d'AUVERGNE (sidejo de la Federacio). Estis 9 kandidatoj ; 7 sukcesintoj.

5. NACIAJ kaj INTERNACIAJ ARANĜOJ

Kelkaj membroj de la Federacio ĉeestis aŭ partoprenis jenajn aranĝojn : Internacia Festivalo (Düsseldorf - 30 dec 2008) ; SAT-Amikara Kongreso (Pau : 11-13 apr 2009) ; UFE Kongreso (Troyes : 8-11 majo 2009) ; U.K. de UEA (Bialistoko : 25-31 julio 2009) ; Kultura Semajno en KATALUNIO (3-10 oktobro 2009)

FEDERACIO ESPERANTO-BRETAGNE (Agadraporto 2009)

Numero de anoj 2009 : 297 el kiuj 281 lokaj klubanoj kaj 16 sendependaj. Krome, kun la 17 homoj de 2 kluboj ne aliĝintaj al la Federacio, entute 314 Bretonoj aliĝas al Esperanto asocio aux grupo.

Numero de partoprenantoj en parolaj kursoj pri Esperanto: 184

Tiu nombro ne respugulas la veran lernagadon pri la internacia lingvo en Bretonujo, ĉar necesas aldoni la korespondajn kursojn ĉe naciaj organismoj, kaj interretajn kursojn de senpagaj retejoj, por homoj, kiuj aliĝas al neniuj asocio.

La Federacio kunigas 21 lokajn grupojn, el kiuj kelkaj estas eĉ kunigitaj en departementaj asocioj, en la jenaj urboj:

- Côtes d'Armor : San-Briego, St Quay-Perros, Plestin-les-Greves, Lannion, Trédez-Loqueveau, Guingamp, Dinan kaj Plélan-le-Petit, kunigitaj en la asocio Esperanto 22, kaj Plouezec.

- Finistère: Kempero, Landerneau, Morlaix, Carhaix

- Ille et Vilaine: Rennes, St Malo, Montfort, Chartres-de-Bretagne

- Morbihan : Vannes, Lauzach, Sarzeau, Hennebont, Pontivy

Plestin kaj Carhaix ne plu proponas kursojn.

Kotizo 2010 : por la membroj de loka klubo : 7€, (por paro: 11 €); por sendependaj individuoj loĝantaj en Bretonujo: 20 € (por instigi ilin aliĝi al klubo), ekster Bretonujo: 11 €; por lernantoj, studentoj kaj senlaboruloj: 3,5€

I- Agado de la Federacio :

- **Eldono de la bulteno** « La Verda Triskelo », po dufoje en la jaro ; krome unu ĉiujara « literatura » bulteno kun « La Vera Saksofono » de la saksa federacio en Germanujo. Tiamaniere niaj respektivaj membroj povas publikigi kaj diskonigi siajn

skribaĵojn en ambaŭ landoj. La enpaĝigo de la unua estas farita bonvole de Jannick Huet-Schumann, tiu de la komuna bulteno estas farita de la sekretariino de la germana asocio. Preso kaj dissendo faritaj en Rennes.

- **Organizo de rondprelegoj de eksterlandaj esperantistoj**

- Kune kun Esperanto France, ni organizis prelegojn de du japanaj esperantistoj de la 22^a ĝis la 29^a de Aprilo en Vannes, Landerneau, Dinan, Pleslan-le-Petit, Rennes kaj Montfort. Ili prezentis muzikinstrumentojn el la tuta mondo kaj intervenis en lernejoj.
- En Rennes: Akcepto de B. Maurer el Erlangen, ivitita de MIR okaze de la eŭropaj tagoj, kaj prelego en Esperanto pri Ermangen en la sidejo de la asocio.
- En St-Malo, juna ukraina sciencisto, fakulo pri sturgoj prelegis lumbilde pri la fiŝoj de la maro Azov, en Esperanto kaj en la franca, en ĉeesto de eksterasocia publiko.

- **Ĝemeligoj**

- Kiel kutime ni eldonis la komunan bultenon kun la Saksa Esperanto Asocio. Saksujo estas partnera regiono de Bretonujo.
 - Jam de multaj jaroj, ni havas tre amikajn rilatojn kun la Esperanto asocio de Wuhan en Ĉinio. Membroj de tiu asocio plurfoje partoprenis en la Internacio Renkontiĝo en Pluezeko. Ilia responsulo, Sro PENG Zhengming gvidis kursojn kaj prelegis en nia regiono.
- Ankaŭ kun la Esperanto federacio de la provinco Ŝandong (Ĉinio) ni kontaktiĝis de 2004. La 10an de aprilo 2008, la ĝemeligo de niaj du federacioj fariĝis oficiala en la ĉeesto de S-ino Nathalie M'Bombo, en la honorsalono de la urbodomo en Rennes. Nia prezidento kaj Profesoro Liu Xiaojun; prezidento de la Ŝandongia Esperanto Societo subskribis ĉartron.
- En 2009, 4 membroj de nia federacio, el kiuj la Vic-prezidento, S-ino Josette Ducloyer, pasigis unu semajnon ne Ŝandong kaj unu alian en Wuhan, invitive de la du ĉinaj asocioj.

- **Eldono**

Eldono de trilingva libro (franca, ĉina kaj Esperanto) „Rakontoj pri Konfuceo“ verkita de Jean-Pierre Ducloyer (FEB) kaj Liu Xiaojun kun la partopreno de Peng Zhengming (Wuhan). La proveldono de 2009 jam estas elĉerpita, kaj ni serĉas financadon por pli ampleksa eldono.

- **La Regiona Koruso MEVEN** kunigas esperantistojn el la tuta Bretonujo. Ĝin estras Franjo Lévêque. Ĝi kuniĝis kun la nacia koruso INTERKANT, por interpreti en Esperanto la ĜENERALA KANTO (poemo de Pablo Neruda kun muziko de Mikis Theodorakis). Unua koncerto okazis en Bouresse (Vienne) la 12an de Julio 2009. Provkantoj okazis en San-Briego, Montfort, Rennes kaj Le Mans. Pere de programo akirita de la Federacio, la korusanoj povas ricevi la partiturojn per Interreto.

Grave estas substreki la elstaran laboron de nia federacianino Franjo Lévêque, la estrino de nia koruso kaj de INTERKANT, kiu krome organizis internacian renkontiĝon de junaj esperantistoj pri la temo „Muziko“ dum la ferioj de la Festo de Ĉiuj Sanktuloj 2009 en Baugé (49), kun la subteno de nia FEB, de Esperanto France kaj de la Eŭropa Unio. Partoprenis ankaŭ junaj bretonaj Esperantistoj.

- **Solidareca agado**

- Helpo al Bona Espero, lerneja farmbieno por orfeŭj en Brazilo. En 2009, tri el niaj membroj laboris tie kiel instruisto, helpanto en la ĝardeno aŭ en la kuirejo.
- Kunlaboro kun solidarecaj asocioj en Kempero, Morlaix, Lauzach, Plouézek, Vannes (Téléthon).

- **Diversaĵoj**

- Loĝistika helpo (ekzamenantoj, korektantoj...) al la ekzamensesioj organizitaj de niaj asocioj.
- Administrado de nia federacia retejo <http://esperanto.bretonio.free.fr/> de Bert Schumann, bonvolulo de la asocio en Rennes, kvar bonvoluloj moderigas la diskutliston de niaj membroj bretonio@yahogroupes.fr.
- Organizado de la ĉiujara ĝenerala kunveno en Loudeac.

II- Agadoj de niaj aliĝintaj asocioj:

Ili zorgas pri la diŝkonigo de la lingvo Esperanto. Tiucele ili organizas kursojn, staĝojn, ekzamenojn, renkontiĝojn kun esperantistaj eksterlandanoj, kolektivajn korespondojn, partoprenas en ĝemeligoj, en lingvoforumoj, en asocioforumoj kaj en aliaj diversaj okazintaĵoj. Ili ankaŭ kunvenigas siajn membrojn okaze de esperanto-okazaĵoj pri tre diversaj kampoj: rolludoj, ĥorkanto, padirado, informadiko...

Jen kelkaj el iliaj ĉefaj okazintaĵoj en 2009:

- En la printempo: loka organizado de diskut-renkontiĝoj kun du japanoj (Temoj: muzikinstrumentoj kaj Hietori-terapio) kaj kun paro de ukrainoj (Temo: la maro Azov) en esperantistaj familioj.
- De la 13a ĝis la 20a de Aŭgusto: 13-a Internacia Esperanto Renkontiĝo en **Pluezeko**, organizita de la loka asocio, kun helpo de membroj de la Federacio. Partoprenis 135 homoj el dek landoj. Matene okazis kursoj pri Esperanto, posttagmeze laŭvolaj agadoj: pedagogio, teatro, informadiko (2 niveloj), ĥorkanto, jogo, botaniko, turismo... vespere, bretonaj dansoj, maristaj kantoj kaj prelegoj.
- En **San-Briego**: preparado de la nacia kongreso de SAT-Amikaro, kiu okazos en Pasko 2010 en Hillion, kun sciencista temo pri la ekonomiaj kaj ekologiaj krizoj. (Batalo por akvo en Bretonujo, risko de malapero de abeloj...) kaj pri literatura temo, rilata al la verko de Louis Gilloux.

- En **Kempero**, partopreno en la komisiono pri internacia solidareco en la urbodomo; en la agado de CICODES, en la librofoiro por gejunuloj en Pluguffan, en la ĝemeligo kun Yantai.

Helpe al la organizado de la nacia kongreso de la esperantistaj fervojistoj en Ploneour-Menez (en Marto)

Inaŭguro de la skvaro Zamenhof en Guimiliaŭ (en Marto)

- En **Rennes**, produktado de 3mm-a filmopor TV Rennes, plurfoje elsendita, organizado de unu prelego de la du japanoj, kaj akcepto de esperantista germanino el Erlangen, invitita de MIR por la Eŭropaj Tagoj, partopreno en la festo en Beauregard.

-En **Montfort**, interveno de la du japanoj en la bazlernejo Notre-Dame, kun prezentado de muzikinstrumentoj.

- En **Chartes-de-Bretagne**, oraganizado de budo en la foiro en Guichen kaj en la Festivalo "Les 4 Coins du Monde" en Chartres.Ĉiusemajna ateliero pri la lingvo Esperanto por infanoj kadre de la asocio ANES en St Jacques-de-la-lande.

- En **Hennebont**, eldono de literaturaj bultenoj "Printempaj Folioj" kaj "Aŭtunaj Folioj" senditaj en naŭ landojn.

- En **Vannes**, korusa agado kaj produktado de muzika komedio en Esperanto, bicikla esperanto-padirado, partopreno en la Golfa Semajno (esperantista teamo en la remila konkurso), akcepto de japanoj.

- En **Sarzeau**, preparado de turisma gvidlibro en Esperanto pri la kastelo en Suscinio

- Ĉiusemajnaj Esperanto-kursoj por plenkreskuloj en 15 bretonaj urboj (185 lernantoj); intensivaj semajnfinaj kursoj en Rennes (11 lernatoj) kaj en Vannes (51 lernantoj) kaj korespondaj kursoj (poŝtaj kaj Interretaj)

- Multaj leteroj intreŝanĝitaj inter bretonaj lernantoj kaj lernantoj el la tuta mondo (ĉefe el la ĝemeligytaj urboj (Eks. Kronach – Hennebont, Yantai – Kempero, Rennes – Brno – Erlangen – Jinan)

- Diversaj ekspozicioj.

III- Diversaj individuaj agoj

- Prelego pri Bretonujo, de Josette Ducloyer en Esperanto-kongreso en Zaozhuang (Ŝandong) en Septembro.

- Interreta Esperanto-kurso por internacia publiko de Béatrice Allée, kadre de la retejoj „edukado.net“ kaj „Dua vivo“

- Partopreno de multaj membroj de FEB en internaciaj kongresoj: en Triesto (Italio), Milano, Zaozhuang (Ĉinio), Bjalistoko (Pollando)

- Eldono de broŝuro por entreprenoj, de la asocio „Entreprise – Esperanto“ kaj propono de profesia instruado pri la lingvo Esperanto por diversnaciaj skipoj.

CENTR-OKCIDENTA FEDERACIO

Nuntempe la federacio estas dormanta : jarkongresoj ne plu okazas, bulteno ne aperas. Aktivaĵoj tamen ne mankas sed ilin faras aparte ĉiu loka grupo kun, laŭ partoprenindeco, invito al najbaraj grupoj : staĝoj, ekspozicioj, Zamenhof-festoj.

ESPERANTO FRANCE-EST

2009: 98 membroj inter ili 33 UFE-membroj

2010: 88 membroj inter ili 31 UFE-membroj

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr/>

Kotizo al federacio **6,50 eŭroj**, abono al bulteno La Informilo **14 eŭroj**. Ĝi aperas **4-foje jare**

Klubo ekzistas en Bar-le-Duc (55), Thionville (57), Metz (57), Nancy (54), Gérardmer (88), Strasbourg (67), Mulhouse (68), Village-neuf (68)

Kelkaj posedas retpaĝon :

<http://esperanto-nancy.fr/>

<http://esperantostrasbourg.free.fr/>

<http://mulhouse.esperanto.free.fr/>

<http://www.esperanto-thionville.ass0.fr/>

<http://osiek.org/eo-metz/reunvend.html>

AGADRAPORTO Espéranto France-Est 2009

La estraro de EFE realigis dum la pasinta agadjaro la jenajn erojn :

Organizado de regiona staĝo kun la grupo Mulhouse-Espéranto en Landersen en marto 2009. Funkciado de Libro-servo okaze de staĝo kaj perkoresponde.

Daŭra funkciado de PKK (perkoresponda kurso)

Informkampanjo pergazeta, perradia kaj pertelevida (regione kaj nacie) pri la kreo de Esperanto-kurso en la Universitato de Alta Alzaco.

Financa subteno al MIREGE okazinta en Grésillon (kunloĝado kaj kunkantado de eŭropaj gejunuloj esperantistaj en la Kastelo Grésillon)

Relanĉo de malnovaj membroj : en novembro 2009 estis dissenditaj

30 alvoko-kartoj en Esperanto al abonantoj de 2008, kiuj ne renovigis sian abonon
150 alvoko-kartoj en la franca por proponi reabonon al malnovaj abonintaj (2000-2007)

Repago de parto de la vojaĝo de Probal DASGUPTA de Rotterdamo al Strasburgo
Partopreno de la prezidanto en kunsido kun la dekano de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj en Mulhouse post akcepto de la Direktoro de la

Altlernejo pri Kemio de Mulhouse, Sinjoro Serge NEUNLIST. (Akceptoj ebligataj dank'al la klopodoj de Cyrille HURSTEL)

Kunlabore kun TAKE : reklambildkarto reklamanta pri la diverseco de la proponitaj lingvoj en la Universitato de Alta Alzaco, inter ili Esperanto, disdonita al 250 interesiĝantoj okaze de la FESTO DE LA LINGVOJ en la fakultato. Krome la informo estas dissendita al ĉiuj liceoj de la departemento Haut-Rhin kaj parte de Bas-Rhin.

KUNORDIGADO pri kalendaro de semajnfinaj staĝoj.

Dissendado de oficialaj dokumentoj al la membroj

Aktualigo de la retejo <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr/>

Regula interkontaktado de la komitatanoj pere de la dissendolisto « Nia komitato »

Informado al dissendo-listo Alzaco-Loreno: alzaco-loreno@yahoo.com

Kunredaktado de LA INFORMILO daŭre prizorgata de Pol DENIS

Nekredeble laciga respondado al la senĉesa postulado de Commission Paritaire des Publications et Agences de Presse por pligo de favoraj tarifoj por la dissendado de LA INFORMILO.

Kampanjo TURISMO PER ESPERANTO

Printempa regiona (internacia) staĝo organizita kunlabore kun Mulhouse-Espéranto en Landersen (Valo de Munster)

Partopreno en aŭtuna staĝo en Germanio, en la mosellanda Esperantosemajnfino en Zell an der Mosel.

FEDERACIO ESPERANTO ILE-DE-FRANCE - AGADRAPORTO 2009

En januaro,

okazis 'Expolangues'. Espéranto France (UFE) provizis budon. La gejunuloj de Espéranto Jeunes (JEFO) prizorgis la aferon kaj esperantistoj de nia federacio helpis ilin.

En aprilo,

La asocio Espéranto Val-de-Seine organizis nian membrkunvenon en Vaux-le-Penil en la 'Maison des associations'.

Kvin postenoj en la komitato estas disponeblaj. Nur 4 personoj sinproponas.

La partoprenantoj en la jarkunveno elektas: Michèle Abada-Simon, Jean Delhomme, Méline Desnos kaj Cyrille Poulet.

La komitato elektas la estraron: William Dumoulin restas prezidanto, Armelle Piolet kaj Olivier Maury restas vic-prezidantoj, Jean Delhomme restas kasisto kaj Jean-Louis Poulet Sekretario. Posttagmeze, ni vizitis la kastelon de Blandy-les-Tours.

En septembro,

okazis la 'Fête de l'Huma'. La Fédération Espérantiste du Travail (FET) provizis budon. La gejunuloj de Espéranto Jeunes (JEFO) prizorgis la aferon kaj

esperantistoj de nia federacio helpis ilin. La Federacio deĵoris forumojn de asocioj en pluraj franciliaj urboj.

En oktobro,

Reekis la kursoj en la sidejo. Kiel kutime, estas tri niveloj (1a, 2a kaj 3a gradoj). La instruistoj estas Michèle Abada-Simon, Anne kaj Claude Jausions.

Dum la tuta jaro

* Trimestra kunveno de la komitato de nia Federacio

* Konversacia Rondo ĉe la sidejo, ĉiujn 2an kaj 4an merkredojn - Jean Delhomme.

* Babilrondo por progresantoj (ĉiun 2an lundon) - Sonia Amariglio kaj Yvette Chatenet.

* Semajnaj staĝoj ĉe la sidejo, 1a grada - Michèle Abada-Simon.

* La bulteno 'Flash' ne eldonitis.

Rilatoj kun Espéranto France (UFE)

Helpo ĉe la sidejo: multaj bonvolemoj de nia federacio helpas ĉe la 'Cerisaie' pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Espéranto France kaj partoprenas en la vivo de tiu landa asocio.

ESPERANTO-MIDI-PYRENEES (FEDERACIO) (JARO 2008-2009)

1. Regiona kunordigado

[Membro \(klubo, individuoj\) kaj evoluo... Federaciaj kunsidoj, kongresoj...](#)

[Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj \(ekz. interfederacia konferenco\)...](#)

La membraro restis kiel lastjare : 100, el kiuj 60 el EKC-Tuluzo, 23 el CEEA-Ariège kaj 17 individuaj membroj de ufe.

Okazis unu **jarkunsido**, la dimanĉon. 14-an de dec. 2008, okaze de la Zamenhoffesto. Partoprenis 14 personoj, el 5 departementoj. Malmultaj (4 ?) partoprenis la ufe-kongreson en Troyes, pli multaj estis en SAT-amikara kongreso okazinta en Pau. La asocio estis reprezentata dum ĉiuj (tri) **ufe-komitatkunvenoj**, de Samia aŭ de Jeannette, kiu ankaŭ membras en naciaj komisionoj (financa kaj Okazas)

2. Informado kaj komunikado

[Federacia gazeto, federacia retejo... Informa materialo... Informado en diversaj medioj \(foiroj, lernejoj, ktp.\)... Partopreno en landskalaj kampanjoj...](#)

Nia asocio havas **informbultenon** kaj **retejon**. Aperis du numeroj de la « Cirkulero de Midi-Pyrénées », sendita ĉefe rete, sed ankaŭ perpoŝte al tiuj sen retadreso. La retejo estas ĝis nun malmulte uzata de la diversaj grupoj kaj departementoj. Oni kontaktu Séverin <dormomuso ĉe gmail.com>

La Ekspozicio de 12 paneloj « Diversité des Langues et Espéranto » estis uzata (en Toulouse, Ariège, Aveyron, . Ili estas uzataj ĉefe sur standoj :

- Forumoj de Linvoj kaj de asocioj (deko en Tuluzo, kelkaj en Ariège, 1 en Aveyron),
- Libro-foiroj (deko en Aveyron),
- Semajnfino por interŝanĝo de konoj kaj spertoj, en Hautes Pyrénées (4-5 okt.)
- Lernejoj (en Ariège kaj en Aveyron).

Ni partoprenis en la **tutlanda opinienketo** de ufe, enketante cent homojn en Tuluzo.

Radioelsendoj pri esperanto okazas regule en Tuluzo, Villeneuve d'Aveyron kaj Foix. Tiuj de Tuluzo kaj Foix povas esti interrete aŭskultataj.

3. Instruado kaj ekzamenoj

[Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj...](#)

[Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenitoj...](#)

Kursoj kaj semajfinaj kursoj regule okazas , iniciate de lokaj grupoj : Tuluzo (du niveloj), Aveyron (unu nivelo), Ariège (Mirepoix, Laroque d'Olme, Foix, Verniolle), Lavaur, Carmaux (2 niveloj).

La 1-an de novembro 2008 la asocio organizis ekzamenojn, kunlabore kun TEF (Fervojistoj), kun 3 kandidatoj, 2 unuaradaj, 1 duagrada, kiuj ĉiuj sukcesis.

4. Kulturo kaj aranĝoj

[Prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj...](#)

[Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj...](#)

La asocio kunlaboris kun Eŭroka por la **koncert-turneo** de Alesandro Cossavella en Francio. Koncertoj okazis en Pau, Villeneuve d'Aveyron, Tuluzo, Béziers (ekster nia regiono)

Akcepto de **preleganto-turneanto** en Villeneuve : ĉi-jare la ukraino Demianenko.

La **Tuluza Teatro Trupo** (TTT) daŭrigis sian aktivadon, prezenante du mallongajn teatraĵojn en **Arkones (Pollando)**, Sabadell (Katalunio), Tuluzo (decembre), Pau (aprile), Troyes (maje). Kaj en julio ĉe **KEF en Danlando**.

Niaj membroj multe **vojaĝas**, ili partoprenis en la Kataluna Kongreso (decembro 2008), UK, IJK, KEF, SAT-kongreso (Milano). Pli ol dek partoprenis UK-on en Bjalistoko.

Septembre ĵus lanĉiĝis **regiono koruso**, dekdu-membra, kiu preparas la 'Canto General', kadre de la tutnacia ĥoro Interkant'.

Produktado de aŭddisko : « Nouveau Cours d'esperanto » estas kunproduktata kun ufe. En projekto estas kunproduktado de Junulkurso, kun Sat-amikaro.

5. Perspektivoj

Estantaj projektoj aŭ agadoj, deziroj...

Ĉi jare mankis interregionaj renkontiĝoj (pasintjare en Montauban, Arrout...)

Nur la koruso estas nova. Ankaŭ pedagogia trejnado kaj ekzamenoj ŝajnas necesaj. Kiel venigi novajn iniciativojn ?

NORDFRANCIA ESPERANTO-FEDERACIO (ESPERANTO-NORD) JARRAPORTO DE LA JARO 2009

1. Regiona kunordigado

En 2009 la Federacio enkalkulis unuflanke 5 membrajn asociojn, nome : Arras, Boulogne-sur-Mer, Dunkerque, Lille-Villeneuve-d'Ascq kaj Valenciennes (sama nombro ekde 2004) ; kaj aliflanke 119 fizikajn membrojn (124 en 2008) : 23 el Arras, 1 el Boulogne, 19 el Dunkerque, 32 el Lille, 25 el Valenciennes kaj 19 izoluloj. Sed plu estas malekvilibro inter la du regionoj Nord-Pas-de-Calais (ĉ. 86 % de la membraro) kaj Picardie (ĉ. 5 %).

La Federacia Komitato kunsidis en oktobro 2009. Ĉi-jare ne okazis formala federacia jarkunveno pro organizaj malfaciloj. La Federacio, membro de UFE, partoprenas ĉiun landan komitatkunsidon.

2. Informado kaj komunikado

La Federacio denove regule publikigas sian esperantlingvan revuon *Norda Gazeto*. Ĝi ankaŭ luas la retregionon « esperanto-nord.org » por sia dulingva, informriĉa federacia retejo (www.esperanto-nord.org) kaj por retpoŝtaj adresoj de siaj servoj, membraj asocioj kaj fizikaj membroj.

La Federacio disponigas siajn membrajn asociojn pri la tri budaj kakemonoj de UFE kaj aliaj komunikiloj eldonitaj de UFE kaj JEFO, listigitaj en la Esperanta versio de la retejo. La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj : asociaraj aŭ lingvaj foiroj, ekspozicioj, ktp. Ili organizis ankaŭ prelegojn en publikaj salonoj, en neesperantistaj asocioj kaj en lernejoj.

Federacianoj kaj klubanoj (ĉefe el Lille) aktivis en la landaj opinienketaj kampanjoj zorgitaj de UFE por iel mezuri konatecon de Esperanto.

3. Instruado kaj ekzamenoj

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj inicajn staĝojn en klubejoj, lernejoj kaj universitatoj, kiuj kunigis centon da gelernantoj.

Konforme al ĝia konstanta ekzamena politiko, la Federacio organizis regionan ekzamensesion en Lille (Nord) dum tuta dimanĉo la 28^a de junio 2009 : tiu sesio enkalkulis la unuajn tri gradojn kaj akceptis 10 kandidatojn — sukcesis ĉiuj el ili. La Federacio pagas mem la ekzamenkotizojn de la kandidatoj-federacianoj.

4. Kulturo kaj aranĝoj

De la 14^a ĝis la 15^a de novembro 2009 okazis la 21^a Eŭropa Rendevuo de Morbecque, kiu akceptis centon da partoprenantoj el Francio, Belgio, Britio k.a. Tie disvolviĝis ses paralelaj staĝoj (lerno de la lingvo, ateliero pri fabelado...), kortuŝa prelego de la polino Barbara Pietrzak, kaj eksterordinara pupa kaj magia spektaklo de la germano Christoph Frank. Tiun sukcesan Rendevuon organizis France kaj Richard Valet, kiu nun deziras transdoni tiun organizan taskon al aliaj federacianoj (v. ĉi-sube).

La kluboj regule rilatas kaj renkontiĝas kun la belgaj kluboj de Kortrijk, Solre-sur-Sambre, Charleroi, k.a. Ili akceptis plurajn eksterlandajn esperantistojn, kaj plurfoje tiuokaze organizis publikajn prelegojn.

Pluraj federacianoj partoprenis esperantistajn kongresojn, renkontiĝojn aŭ staĝojn en Francio aŭ eksterlande.

5. Perspektivoj

La Eŭropa Rendevuo, majstre organizita de France kaj Richard Valet, estos nun organizata de Arlette kaj Edmond Plutniak. Krome ĝi okazos ne plu en Morbecque sed en la marborda urbo Stella-Plage (apud Le Touquet). Informoj alvenos pri tiu novforma Eŭropa Rendevuo de la Federacio.

La Federacio invitis la najbarajn Francilian kaj Normandian Federaciojn por komune kongresi en aŭ ĉirkaŭ la pikarda urbo Amiens en printempo 2010. Tiel eblas senperaj interŝanĝoj kaj pliproksimiĝo de la tri federacioj.

ESPERANTO-PROVENCE – jara raporto por 2009

Membraro :

La Esperanto-Provence Federacio havis 171 membrojn je la 31-a/12/2008.

13 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj : 04 Manosque kaj Villeneuve ; 05 Gap ; 06 Nice, Cannes ; 13 Aix en Provence, la Ciotat, La Roque d'Anthéron, Miramas ; 83 Fréjus-ST Raphaël, Toulon ; 84 Avignon, Carpentras.

Administro :

Membrokunveno okazis en La Roque d'Antheron la 17an de majo 2009, la antaŭan sabaton, la 16an okazis trinivelaj kursoj : « Kantu por lerni » kun Rose-Marie Quintin, « Pentro-arto » kun Nina Gouriou kaj «150 jariĝo » kun R.Triolle.

Nova estraro estis elektita :

Prezidanto : Pierre Oliva

Vic-prezidantino : Monique Prézioso

Sekretariino : Monique Arnaud

Help-Sekretariino : Claudie Demongeot

Kasisto : Michel Cerisay

Respondeculo pri bulteno : Renée Triolle

Rilatoj kun Esperanto France : Gilles Walles.

Komunikado kaj informado :

La federacio daŭre eldonas sian ĉiutrimonatan revuon : « *Esperanto-Provence* »

Unu klubo eldonas propran revueton.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj : forumoj de la asocioj – Manosque, la Ciotat, Aix en Provence, ekspozicioj – Manosque, Gap, la Ciotat, ST Raphaël. Tago de la gepatra lingvo en la Ciotat, en partnereco kun asocio « Le Grand Portique » kaj en ST Bonnet en lernejo. Tago de la Virinoj en la Ciotat.

En septembro, dum unu semajno estis ekspozicio pri la Paco en la Ciotat kaj R.Triolle prelegis pri « Kial Esperanto estas lingvo de Paco ? »

Saman semajnon, ĉiuvespere okazis prezentado de Esperanto inter la 18a kaj la 19a fare de P.Oliva . Festo de la Pacmovado okazis en Ste Tulle, same en Gap.

Eŭropa Tago de la Lingvoj en ST Bonnet

Radio-elsendo ĉe « Radio-Dialogue » : Jeanine Ratouchniak,

En « Agenda 2009 » de « Art et Culture » de Cadarache, aperis tute kolora paĝo pri esperanto dank'al Jose Grammatico. Enketo de Esperanto-France :

Enketitaj estis 853 homoj en Aix, Carnoux, La Ciotat, Marseille, Salon (13), Manosque (04), Gap (05). Enketis ĉefe Monique Arnaud, Michel Eliard (en "Salon de l'Etudiant en Marseille), Renée Triolle. Oni povas imagi, kiom plej bone estus se ĉiuj same farus. Agrabla laboro dum vi atendas en stacidomo, surstrate, dum foiroj aŭ salonoj kaj bela okazo sinturni al la homoj por ne nur enketi "ĉu ili scias, kio estas esperanto", "kiel ili aŭdis pri ĝi" "aŭ "ĉu ilia opinio, Eŭropa Unio devus konigi ĝin" . Ĉefas krei okazon alparoli la homojn kaj plu informi pri la lingvosituacio kaj ĝia faciligo per esperanto . Distribuo de la kalendaretoj de JEFO al ĉiuj kaj informilo de UFE "Langue équitable" al la vere interesitoj helpas konigi la nomon "esperanto" en nia regiono. La rezultoj similis la francajn .

Pri Eŭropa baloto, multaj lokaj esperantistoj provis informi la ĝeneralan publikon : 1653 homoj voĉdonis por EDE en Provenco.

Assimil de Poche aperis en majo, laboro de Renée Triolle kaj Jean-Louis Texier. Dankon al ili.

Prelego de R.Triolle en Tulono : « Kiu(j)n lingvo(j)n por Eŭropo ?

Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciajn staĝojn en klubejoj, lernejoj. La klubo Fréjus-ST Raphaël organizis M.E.S , unu semajnan staĝon ĉe marborbo en Agay, partoprenis multaj eksterlandanoj. Nun en Aix estas Literatura Kafejo. Ekzamensesio okazis en Marsejlo – una kaj dua grado .

Kulturo kaj aranĝoj :

Konstantin Demianenko, el Berdiansk, fakulo pri fiŝoj prelegis en Marsejlo kaj en La Ciotat.

Ekskurso al la montaro, la Sainte Victoire , pikniko, bankedo.

En ST Raphaël oni ofte festas kaj aperigas fotojn en la loka gazeto. Julia Boyborodina el Novosibirsko, dufoje vizitis la klubon.

Amika renkontiĝo okazis en Carpentras printempe.

Multaj federacianoj partoprenis esperantajn kongresojn aŭ renkontiĝojn (francajn kaj eksterlandanajn) kaj staĝojn.

Katarina Farago plurfoje prezentis la Yumeiho terapion en Contes apud Nice al praktikantoj de jogo, en ST Raphaël al la loka grupo, en Gap kaj ST Bonnet al la publiko. Ŝi prelegis pri sia lando , Hungario, en Marsejlo kaj pli detale en La Ciotat dum semajnfina staĝo .

2 Japanoj, Tacuo kaj Masumi montris, kiel bele enpaki donacojn laŭ la japana metodo, t.e. per tuko.

Venontaj Projektoj :

M.E.S. Mediteranea Esperanto Semajno okazos en Agay de la 27-a de februaro ĝis la 7-a de marto 2010. Marsejlo estos Urbo de kulturo en 2013 .. ni pripensas por eniri programon

Fédération Espéranto Rhône-Alpes - année 2009-2010.

1°) Fonctionnement de la Fédération, Réunions du conseil d'administration et du bureau

Le bureau seul s'est réuni 2 fois depuis la dernière AG :

-le 13/09/2009 à Montebenoît (Savoie)

-le 5/10/2009 à Saint-Étienne

Le Conseil d'administration s'est réuni 2 fois depuis la dernière AG :

-18/10/2009 à Lyon au KoToPo (notre siège social)

-24/01/2010 à Lyon au KoToPo (notre siège social)

Lors des réunions les discussions ont porté principalement sur l'organisation du congrès annuel, sur les besoins de formation, les relations entre les associations membres, le soutien à divers activités ou projets en lien avec l'espéranto.

2°) Relation entre les associations membres

Les relations entre les associations membres sont assurées lors de réunions du conseil d'administration, où chaque club informe la fédération du suivi de ses activités. Il apparaît important de savoir ce qui se fait ailleurs, quelles sont les réussites notamment dans la divulgation de l'espéranto auprès du public, quels sont les problèmes.

Les autres rencontres comme des stages de formation ou des rencontres à un niveau local, mais aussi bien sûr le congrès annuel sont autant de moyens de tisser des liens et d'impulser le désir de projets et d'activités communes.

Notons que la fédération a soutenu cette année la création d'une nouvelle association à Chatillon-sur-Chalaronne dans le département de l'Ain.

3°) Relation avec Espéranto France

Monique FILLIAT puis Mireille BESSET ont régulièrement participé aux réunions d'Espéranto France à Paris. Par ailleurs Mireille assure un information sur les activités ou les questions qui se posent au niveau national, des membres du CA par le biais de la messagerie.

4°) Appui fédéral aux groupes

La fédération essaie de faire des choix qui permettent une aide locale aux associations. Notamment mettre à disposition du matériel pour aider à la diffusion de la langue ou pour que les groupes se fassent connaître. Cette année on peut mettre en avant :

-l'achat de panneaux d'accueils pour les forums ou les foires

-le financement du tract publicitaire imprimé par un professionnel en couleur, pour le congrès. Ceci afin de donner une bonne et belle image de l'espéranto et de nos associations.

-la mise à disposition des panneaux de l'exposition d'Espéranto France

5°) Communication vers l'extérieur

Un des rôles de la Fédération est de faire parler de l'espéranto. Mais la communication est un métier. Les moyens nous manquent et il faudrait pour initier un tel travail trouver quelqu'un qui accepte de prendre le dossier en mains. Le site Internet peut jouer un rôle important en ce domaine.

Beaucoup d'associations font paraître des articles dans la presse locale ou même régionale. Ces petits communications répétées localement ont un effet à moyen terme, car on sait que l'espéranto existe, on en entend parler.

La coordination avec le niveau national est aussi à creuser pour harmoniser la communication vers le grand public.

6°) Formation

Un des engagements pris lors de l'assemblée générale de Moûtiers touchait à la formation.

Deux stages visant ceux qui enseignent ou voudraient enseigner avaient été organisé à Romans, mais devant le manque de participants, nous avons du modifier notre projet de formation. Prévoir assez longtemps à l'avance des stages à la journée, ce qui est plus facile pour beaucoup, à un niveau moins haut que ce qui avait été fait à Romans et avec si possible au moins deux intervenants différents.

Ainsi un stage a eu lieu à Aix-les-Bains le 20 mars 2010 animé par Claude Gerlat et Philippe Pellicier. Y ont participé 25 personnes venus de 9 associations différentes. Les axes de cette journée ont été la conversation et des points de grammaire qui sont l'objet d'erreurs récurrentes. Les participants ont donné une appréciation très favorable à cette journée avec le désir unanime que cette formation soit renouvelé de façon régulière plusieurs fois dans l'année.

7°) le site Internet

Le site Internet continue de fonctionner et d'être maintenu par Philippe Pellicier. Mais il faut noter un manque chronique d'intérêt de la part de tous, alors que les associations avaient unanimement appuyé la construction de ce site.

Il y a donc une contradiction qui devra être discutée et résolue pour l'année à venir. Par ailleurs l'administration du site devrait reposer sur au moins deux personnes, voire davantage.

Ce site s'est largement fait l'écho des congrès soit avant, soit après. Il donne aussi des nouvelles des groupes et de leurs activités, lorsque ceux-ci veulent bien faire parvenir à l'administrateur les informations nécessaires. Il permet aussi de toucher des gens qui ne connaissent pas l'espéranto et se manifestent par le biais du site.

8°) Le congrès de Moûtiers

Il a été organisé conjointement par les deux associations Albertville Espéranto et Tarenteza Espéranto. Il s'est déroulé pendant 3 jours du 30 avril au 1er mai 2009. Il a été très riche en activités dont une des orientations a été de toucher le public non congressiste. Un succès apprécié par tous les participants. Bien que le public local ait été présent, nous attendions tout de même un peu plus de réaction. Nous avons inauguré de nouvelles formules comme une soirée en continue avec conférence, suivie d'un buffet et de la soirée spectacle.

A noter aussi pour la première fois qu'un tract publicitaire a été réalisé par un imprimeur professionnel, ce qui donne une image « professionnelle » du congrès et de l'espéranto. Ce tract a été tiré à 5000 exemplaires et distribué dans les associations régionales mais aussi les Fédérations en France. Localement les

écoles, et diverses associations ayant des buts proches de nos préoccupations, ont également été approvisionnés en tracts.

Pour le détail des activités du congrès voir le compte-rendu de Tarenteza Esperanto.

9°) Soutiens sur l'extérieur de la Fédération

- Espéranto jeunes a été subventionné à hauteur de 150€ en vue d'aider à l'opération petits calendriers, dont nous bénéficions largement
- En ce qui concerne MIREGE, la fédération s'est engagé à subventionner en cas de déficit, en accord avec Franjo Provost.

Fédération Espéranto Rhône-Alpes

– siège social : kotopo, 14 rue Leynaud, 69001 LYON

– secrétariat : Philippe Pellicier, chemin de la Chenat 73260 SAINT-OYEN – tél 04 79 01 14 69

----- ASOCIOJ -----

F.E.T Fédération Espérantiste du Travail (jarraporto 2009)

La plej grava agado de nia asocio, la homarresta budo, estis granda sukceso. Pri la Homarresta budo

En septembro 2007 FET aĉetis novan tendon kaj diversajn materialojn. Tiel la budo kreskis de 6m2 ĝis 30m2. Kompreneble la prezo de la budejo ankaŭ kreskis...

En septembro 2008 FET aĉetis (200€) du 5-metrajn mastojn por la flagrubando kaj por subteni la elektran kablono. Ni havis gravajn problemojn pasintjare pro tio. Jaron post jaro ni plibonigas la budon.

Tiun jaron la festo estis grandega sukceso kun pli da vizitantoj ol kutime. Certe la muzikprogramo kulpas pri tio (tiel la ĉeesto de Manu Ĉao). Dum tri tagoj ni parolas kun centoj kaj centoj da homoj. Dum la budo 2008 ni vendis 5 foje pli da esperanta materialo ol dum 2005 ! Kaj preskaŭ duoble pli ol dum 2007 !

Tio estas granda sukceso. La rezulto estas la sama en 2009.

2009

Monproblemo

Tamen FET ne eldonas vortarojn kaj lernolibrojn. Do la monprofito ne iras al FET. Plie, ĉar FET ne disdonas esperantajn kursojn en Parizo, la publiko iras por lerni

esperanto ĉe UFE aŭ ĉe SAT-Amikaro. De du jaroj ni petis monon de la tri plej grandaj esperantaj asocioj : UFE, JEFO kaj SAT Amikaro. La tri asocioj akceptis helpi la budon donace, po 200€. Tiu jaro ĉiu asocio pagis.

Tiu jare ni devu aĉeti novan tendejo po pli ol 1000€. Por klarigi la aferon, ĉiu devas scii, ke pro sekurecaj aferoj ni devas plibonigi nian materialon. Ne eblas fari alimaniere, la prefekto povas rifuzi la malfermon de la budo.

La montresoro de FET sufiĉos. Sed poste ni devos trovi alian helpon aŭ la helpo de SAT Amikaro k UFE k Esperanto-Jeunes devos esti pli alta.

Helpuloj

Ĉiujare Fet ricevas helpon de membroj de SAT Amikaro, UFE kaj JEFO. Tradicie la plej granda parto de la helpo estas tiun de jefo. Sed en 2008 ni vidis preskaŭ neniun de Jefo (laŭ mia sciado Jefo havas novaj membroj kiu neniam ĝis nun partoprenis en homarfestoj). Feliĉe de du jaroj ni ricevis plej grandaj fortoj de SATamikaranoj.

En 2009 pluraj novaj membroj de Jefo alvenis. Por la festo 2010 ni esperas ke ni akceptos ankoraŭ pli da esperantistoj por helpi.

Jen mallonga raporto pri la agado de **FKEA dum 2009**:

Francaj katolikaj esperantistoj komencis la jaron en Choisy-le-Roi, partoprenante, la 4an de januaro, Feston de la Nacioj organizitan de la loka parokho.

Ties koruso speciale lernis Epifanian kanton en Esperanto kaj, kiel tradicie, fine de la meso okazis multlingvaj salutoj: je la fino en Esperanto nome de ĉiuj nacioj kaj lingvoj ne reprezentitaj.

Membroj de FKEA aktive partoprenis en pluraj Eo-eventoj, notinde:

- interesocia kongreso en Troyes, dum kiu okazis nia ĝenerala asembleo;
- ekumena kongreso en Vroclavo, Pollando, dum kiu estis decidite organizi la jubilean (1910-2010) kongreson de katolikaj esperantistoj en Parizo.

Pluraj membroj jam aktivis por prepari tiun kongreson, kiu okazos en Montmartre de la 27a de junio ĝis la 3a de julio 2010.

Jarfine, membroj de la pariza regiono kunfestis en Couvent St Jacques, laŭ invito de nova esperantisto, fr. Benoît Ente, juna dominikano kiu eksciis pri Esperanto danke al P. Bourdon. Oni legis kaj komentis kune la libron de Jona en la Biblio kaj disdividis festan manĝon por transiri al la nova jaro.

Krome, ni komencis krei propran TTTejon de FKEA/ACFE: <http://www.fkea.fr/>

Espéranto Jeunes (JEFO)

La ĉefa projekto de JEFO en 2008-2009 estis la organizado de FESTO post unu jaro da paŭzo. Dank' al la helpo de la germana asocio GEJ kaj de Eurokka, ni povis efektivigi tiun FESTOn en Zwingenberg (BERGSTR.) en Germanio de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto. FESTO estis sukceso: inter 70 kaj 80 homoj partoprenis. La etoso estis tre bona kaj multaj koncertoj okazis.

Dum tiu FESTO, la ĝenerala kunsido okazis kaj nova komitato kaj nova estraro estis elektitaj. Jen la nova generacio: Emmanuel Bosquet iĝis prezidanto, Maxime Valy iĝis vicprezidanto, Quentin Weber Seban iĝis kasisto, Baptiste Darthenay iĝis sekretario, Alexandre Raymond iĝis respondeculo pri renkontiĝoj, Salomé Hug iĝis respondeculino pri revuoj kaj Julia Hédoux iĝis vickasistino.

Samtempe, novaj T-ĉemizoj aperis: Biero-vino-Esperanto, nigra FESTO -Tĉ, kaj ruga FESTO-Tĉ. Novaj kalendaroj estis ankaŭ aperigitaj en 2009.

La aliaj projektoj daŭrigas kiel la interretaj kursoj, varbado pri Eo en la budo de SAT dum Homarfestoj, helpo dum Expolangues, kaj la subvencio "unua renkontiĝo".

AGADRAPORTO GEE 2009

La lasta Ĝenerala Asembleo de GEE okazis en Troyes.

AGADRAPORTO de GEE - franca sekcio de ILEI - 2009

La estraro : Dechy Michel, Prezidanto de GEE

Catil Jo, vicprezidanto de GEE

Houviez Maryvonne, sekretariino

Riste Gaston, vic-sekretario

Arnaud Monique, kasistino

GEE havis 34 membrojn al ILEI.

En 2009, GEE ne organizis staĝon por instruantoj, sed pluraj Gee-anoj organizis staĝojn, inter ili :

M.E.S. (Mediterranea Esperanto Semajno) en Agay apud ST Raphaël sub gvido de C. Graissaguel kaj M Presiozo. Kultura semajnfino en La Ciotat kun R. Triolle.

Michel Dechy gvidis staĝon en Greziljono, la unuan semajnon de julio en 2009, uzante ĉefe la bildstrion "Tinĉjo en Tibeto" kiel lernolibron.

La asocio monhelpis la renkonton MIREGE=**M**uzikaj, **I**nternaciaj, **R**enkontoj Esperantistaj por **G**ejunuloj **E**ŭropaj.

Dum la ILEI-konferenco en Pollando julio 2009, Sinjorino Poux reprezentis la GEE-asocion.

En la regiono de Besançon nia amikino Jacqueline Poux ne scias kiamaniere enkonduki esperanton pro la premo de la angla lingvo. Ŝi organizis novan kurson por plenkreskuloj en la asocio « Naturamikoj ».

En Chateauroux , komuna laboro okaze de la vojaĝo tra la mondo de Alice kaj Cedric « Portreto de Planedo » : Infanoj el diversaj lernejoj diversnivele raportas pri ili pere de ekspozicioj prezentitaj en multnombraj lokoj (biblioteko – klasĉambroj – bazaroj, ktp...) kaj multfoje dum la jaro !

Je la universitata nivelo, grupo de studentoj partoprenis en « Renkontiĝo kun Esperanto » , angla junulo klarigis kial angloparolanto lernas Esperanton.

Infandesegnaĵoj: la vojaĝo estis la temo 2008, do ekspozicioj okazis je la komenco de 2009. (januare en la mediateko de Châteauroux, kaj en mezlernejoj, renkontoj kun infanoj) sed la temo 2009 estis pri « legendoj el via lando aux el via regiono »: la ekspozicioj okazis de septembro ĝis decembro 2009 pri tiu temo.

Vizito de Hori Yasuo kaj Arai Toshinobu en mezlernejo kie ekzistis de longe klubo pri Japanio.

Tre bona renkonto kun gelernantoj el la 2 kluboj kaj multe da aliaj gelernantoj kaj plenkreskuloj.

Grava afero pri ne perforto novembre 2009 dum 2 semajnaj renkontoj. Venis bonaj respondoj el multaj landoj, ĉu de esperantistaj kluboj ĉu de lernejoj : desegnaĵojn, fotojn, skribaĵojn pri la temo de ne perforto, ĉio farita de infanoj. Ekspozicio estis unue kune kun la aliaj asocioj kiuj partoprenis dum la 2 semajnoj, kaj poste sola (10 paneloj 80x135) en lernejoj.

La loka grupo sukcesis aperigi sian adreson en la urba gvidlibro ene de la rubriko « Vivantaj Lingvoj ». Maryvonne Houvriez invitis Mirelle Grosjean (el Svisio) por prelegi pri la Pacmovado en Japanio kaj pri Edukado al kulturo por la Paco. Ŝi partoprenis renkontojn en mezlernejo kaj en IUT kun studentoj.

En Bretonio, 192 homoj partoprenis Esperanto-kursojn kaj multaj lernis per la reto aŭ per korespondaj kursoj.

Renée Triolle daŭre sukcesis informi pri Esperanto dum specialaj eventoj : Tago de la gepatra lingvo en la Ciotat. En partnereco kun asocio « Le Grand Portique ». Tago de la Virinoj en la Ciotat kun aliaj asocioj.

Renée Triolle organizis ekzamensesion en Marseille kaj Michel Dechy en la norda departemento.

Pri la libreto « **Rakonto pri tarofolioj** », verkita dum la ILEI-Konferenco en aŭgusto 2008 en Porto-Novo Benino, J.P.Boulet kaj M.Arnaud fotokopiis 300 ekzemplerojn en aŭgusto 2009 sendante 290 al diversaj homoj en Afriko. Sed nur duono de la homoj respondis ke ili ricevis ilin... Kial ? Eble pro malfacila aliro al la reto, pro forgeso ke ili ne ricevis ilin ? Tamen, homoj kiuj ricevis ilin dankis nin, dirinte, ke ili uzas ilin. En Burundio Jeremy Sabiyumva dezirus havi pli grandan kvanton. Kiamaniere ni povus helpi lin ? Sed pli ĝenerale kiel disvastigi tiun libreton ?

Okaze de la **35-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO**, kiu okazis en Parizo de la 6-a ĝis la 23-a de oktobro 2009, la tri reprezentantoj – Arnaud Monique, Boulet Jean-Pierre, Lo Giacomo François- havis okazon, ne nur informiĝi pri multaj aferoj – ekzemple : kulturaj mezuriloj, instruado en gepatra lingvo minoritata, kreativaj urboj... sed ankaŭ informi homojn pri Esperanto kaj nia libreto « Rakonto pri Tarofolioj » .

Ili tiel ligis kontaktojn kun la delegacio de Malio kaj Benino, la ambasadorino de Kubo (kiu kompreneble jam scias pri la venonta U.K. kaj eĉ informis nin pri esperanto novaĵo en Kubo), la ambasadorino de Madagaskaro, kaj aliaj homoj inter kiuj pluraj stabanoj de UNESKO el tre diversaj landoj , kiuj multe interesiĝis pri Esperanto eĉ skribante sloganon en esperanto sur sian tabulon (Jean-Pierre petis kaj obtenis permeson skribi : « ni parolu » kaj poste laŭ lia indiko, respondeculo aldonis « Lingvoj gravas »).

La vortaro, kiun oni donacis antaŭ kelkaj jaroj, bone vidiĝas sur breto de la biblioteko en kiu oni povas ankaŭ konsulti jarlibron de UEA, PIV.....

Multe helpis la kalendaretoj 2010 de Jefe, kiujn ni disdonis kiel donacojn. Dank'al la mona subteno de GEE franca sekcio de ILEI, ni havis provizon de specialaj, ĝisdatigitaj flugfolioj por prezenti ILEI en lingvoj franca, angla, rusa, ĉina, sed la traduko en la araba lingvo ne estas finverkita.

Ni bedaŭras ke tiu-ĉi raporto ne estas kompleta pro ne ricevo de ĉiu ajn kolegoj.

Kadre de GEE Michel Dechy planas organizi staĝon por instruantoj en 2011, kun Béatrice Allée.

Raporto verkita de Monique Arnaud kaj de J Catil.